

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

**ALDONO:** Ĉi-numere, kolora folio pri Solresol estas aldonita, rekompence al la paĝoj 2 kaj 3 en la junia n-ro ne bone presita.

## 103a Legokunsido

En la 11a de julio, ni havis la 103an Legokunsidon pri “Tamen ĝi moviĝas”, esearo pri Esperanto-movado. Nur 4 personoj ĉeestis, kaj ĉi tie ni aperigas ankaŭ eseon de Mizro Iwaya, kiu elektis tiun ĉi libron por la Legokunsido, sed ne povis ĉeesti en la kunsido mem.

(Sibayama Zyun'iti)

### Novaj vortoj bonvenaj el “TAMEN ĜI MOVIĜAS”

TANIGAWA Hiroshi

Kiam mi legas esperantan artikolon aŭ verkaĵon, ofte mi stumblas kaj sentas min perdiĝanta en lingva labirinto. Mi ŝvitas precipe kiam temas pri novstilaj verkaĵoj aŭ eseoj kun kompleksaj, komplikegaj kombinoj de tre malfacilaj kaj tre delikate nuancitaj vortoj kaj esprimoj. Novaj vortoj, neologismoj min ofte ĝenas. Sed kiam fine mi eksentas la riĉe nuancitan psikan mondon, mi plene konstatas, ke nia esperanto tiamaniere alloge, nuancoplene riĉigas nian sentimenton en nia koro.

El “Enkonduko”; HUMPHREY TONKIN KAJ MICHELA LIPARI

Mi kontentiĝis trovinte en p.11 argumenton; “la lingvo devas esti komplika por esti plene esprimiva – sed (se ni rajtus tiel paradoksi) gravas kompliki la lingvon kiel eble plej simple, por ke homoj povu facile mastri ĝin. Jes, ja evitu ekstremon.”

Ankaŭ mi plene konstatas, ke la lingva vojo

troviĝu meze inter “kompliko” kaj “simpleco”.

Mi ĉiam kredis, ke esperanto kuntenas esence elastan mirige riĉegan povon de vortofarado surbaze de la “Fundamento” kiel neniam ŝanĝebla gramatika principo tute egale al komencantoj kaj al kompetentaj verkemuloj. Kiam mi legas,— kvankam tre malmulte— mi ofte rimarkas “ĉarmajn esprimojn” kiujn mi trovas, “jen, esperanto!” Kaj “kompliki la lingvon kiel eble plej simple!” En esperanto certe kunvivis la kompliko kaj la simpleco.

El “Post legado de ‘La Mava Lingvo’ ”

Ankaŭ ĉi tie mi trovis argumentojn temantajn pri novaj vortoj aŭ neologismoj. La aŭtoro analizas; “ ‘neologisma problemo’ senĉese obsedas svarmon el lingvistoj... Tiom, ke ofte la recenzoj neglektas la enhavon de la verkoj... Bizara fenomeno! Zamenhof ne nur indikis la ĝustan metodon por riĉigadi la lingvon, sed mem abunde aplikis ĝin en ĉiuj siaj verkoj. Li enkondukis centojn da novaj vortoj ne-fundamentaj...”

Mi de longe konstatis, ke esperanto riĉiĝis



lingve dank' al tiuj, kiuj senĉese batalintaj por kuraĝe uzi “novajn vortojn,” “novajn esprimojn” reagante al la ĉiam ŝanĝiĝantaj sociaj medioj.

Mi mem tute ne kapablas aŭdaci uzi freŝajn t.n. neologismojn memvole. Sed esence mi bonvenigas novajn vortojn por esprimi delikatajn sencojn precipe por konfomiĝi al nuna socio ĉiam ŝanĝiĝanta.

Ekzemple en Japanio la uzo de la vorto signifanta “homojn fariĝintajn altaĝajn” atentinde ŝanĝiĝis en nuntempo. La tradicia vorto “老人; roojin; maljuniĝinta homo” estas ne ŝatata de ili mem kiuj pensas, ke la vorto kuntenas ian “konsolan senton”. Nuntempaj altaĝuloj ne ŝatas esti rigardataj kiel konsolendaj homoj. Mi certigis la klarigojn en la vortaroj;

“**olda**”;

① *DAIGAKUSYORIN; VORTARO DE ESPERANTO, 1965*;

“詩 (poetiko) := maljuna (年寄りの)”, = malnova

② *Esperanto-Japana Vortaro, JEI, 2006*;

“雅 (formo aŭ senco uzata ĉefe en poemaĵoj); 年老いた (maljuniĝinta), (sinonime) maljuna”

③ *PIV 1970*; neologismo: maljuna

(Mia PIV 1970 povas esti jam tro arkaika. Eblus, ke oni trovas novan klarigon en la nova versio de PIV)

— Laŭ ① “olda” egalas kun “maljuna”. Sed ② metas la vortojn “maljuniĝinta”, kaj “sinonime, maljuna”.

Mi ne povas firme konstati, ĉu niaj vortaroj trafe reflektas la aktualan ŝanĝiĝon pri la uzo de la vorto “maljuniĝinta homo”. Sed tre verŝajne japanaj esperantistoj konscie aŭ nekonscie, praktike uzas la vorton “olda” kun certa senco malsama kun “maljuna”, mi pensas.

Ĉiuokaze mi dankas niajn antaŭajn kaj nuntempajn esperantistojn, kiuj senlace klopodadis kaj klopodas ellabori esperanton por ĉiam pliriĉigi ĝin, kuraĝe enkondukante novajn vortojn kaj esprimojn konforme al la ĉiam ŝanĝiĝantaj sociaj medioj.

Mi fine deziras aŭdace diri “bonas”, ke iu japana sinjorino uzas la vorton “bonas”.

## Tamen ĝi moviĝas! - Diversaj aspektoj de Esperanto-movado

Mizro Iwaya

Tiu ĉi libro estas la tria kolekto de eseoj premiitaj en la belartaj konkursoj de UEA. Ĉi-foje temas pri Esperanto-movado.

Unue mi devas menciigi du eseojn de Mark Fettes, nuna prezidanto de UEA. Li verkis ilin antaŭ ĉ. 25 jaroj, kiam li laboris en la centra oficejo de UEA, Roterdamo. Li analizis Esperanto-movadon el diversaj flankoj: idealo-realo, organiza principo, k.a. La analizo mem estas perfekte okulfrapa. Sed tiam venis al mi dubo. Certe li estas talenta sociologo, sed ĉu li povas esti talenta politikisto? La tasko de la prezidanto de UEA estas ĉefe strategio konduki UEA. Ni devas sekvi lin kun atento kiel li sukcesos (aŭ malsukcesos?) solvi tiun problemon en UEA.

Due mi rimarkis la argumenton pri facileco kaj simpleco de la lingvo Esperanto: “La mava lingvo” de Sen Rodin. Ĝi estas kontraŭtezo al fama aserto “La bona lingvo” de C. Piron. Estas jam longe de kiam ni vidis tiuspecan argumenton en diversaj revuoj kaj libroj. Kelkaj bonlingvistoj eĉ diras ke poetoj detruas nian lingvon. Sed la aŭtoro asertas ke la afero estas ĉiam sama ankaŭ en niaj naciaj lingvoj. Ni kutime parolas en facila kaj simpla maniero, sed samtempe kelkaj filozofas aŭ beletrumas en la malsimpla lingvo. Ni ne bezonas malaprobi tiun flankon.

Laste mi volas menciigi tute alian flankon de nia kulturo, nome kinarto. Lastatempe mi trovis faman kaj fantoman filmon de esperanta originalo nomatan “La angoro” en YouTube. Stranga filmo! Ĝi certe estas avangarda, sed tute ne estas bonkvalita. Poste mi trovis diversajn dokumentajn filmojn de Roman Dobrzyński. Ili estas “normalaj” filmoj. Mi trovis en tiu ĉi libro ke reĝisoro Mihm estas la ĉefa figuro de esperanta kinarto, kiu produktis jam plurajn esperantajn filmojn. La malfacileco kuŝas en relative malgranda merkato. Ni atendu lian pluan aktivadon.

Tiu ĉi libro estas foje malfacila, foje teoriema, sed sufiĉe rekomendinda ĉar ĝi montras ĝeneralan perspektivon de Esperanto-movado. Vi certe trovos ion novan en ĝi.

---

---

## Eseoj

---

---

### Ekskurso al Mooka kaj Maŝiko

FUSE Kentarou

En la 3-a de aprilo ni, 11 partoprenantoj, iris al Mooka kaj Maŝiko. De Jokohamo unue per trajno kaj due per aŭtobuso ni iris al urbo Mooka. Kiam ni atingis la urbon, ĉe bushaltejo Tamaĉi ni malsupreniris de la aŭtobuso. De tie ni piediris promenejon laŭ la rivero Gjooja. Ĉar en ambaŭ flankoj laŭ la rivero oni povas vidi multajn sakuro-arbojn, kaj tiam feliĉe sakuro-floroj tre multe floris. Tial ni ĝuis mildan atmosferon en printempo.

Oni diras ke en la urbo kreskas 10 mil sakuro-arboj, kaj tial ĉi tie oni festas Sakuro-feston ĉiuprintempe. Kiam finiĝis la vico de sakuro-arboj sur la promenejo, ni iris al strato de la urbo.

#### Memordomo de Kubo

Post promeno de la trotuaro sub la sakuro-arboj, ni atingis la Memordomon de Kubo. Antaŭe la domo estis posedaĵo de la familio Kubo. Kaj nun la domo estas malfermita kiel la Memordomo de Kubo. En la domo estas ekspozicie pri s-ro Kubo Sadaziroo, kiu estis esperantisto kaj de 1989 ĝis 1996 estis ĉefprezidanto de JEl. Kaj tie ni vidis la ekspozicion pri lia vivo kaj lia agado. En la ekspozicio ni trovis pri esperantaj enhavoj, ekzemple sur lia malgranda taglibro li skribis lian decidon al Esperanto, kiam li estis 19-jara lernanto. Kaj tie ankaŭ ni sciis lian agadon pri eduko de arto.

#### Ekspozicia domo pri arto

Najbare staras la Ekspozicia domo pri arto. Kiam Kubo vivis, li uzis la domon kiel lia ateliero. En la domo ni vidis kelkajn tiamajn fotojn. Pere de la fotoj ni povis senti la gajan agadon de lia ateliero. Kubo estis kritikisto pri arto, kaj li interkonatiĝis kun multaj artistoj. En la domo nun estas ekspoziciataj, artoj de virinaj artistoj, kun kiuj li interkonatiĝis.

#### Kubo-aŭditorio

Post la tagmanĝo ni renkontiĝis kun familio

Gemrich, geedzoj kaj du filoj. La edzino estas nepino de s-ino MACUNO, kiu estas unu el la partoprenantoj. Kaj kompleze la familio per siaj aŭtoj nin veturigis al la Kubo-aŭditorio. En iom malproksima loko la aŭditorio estis. Nun la domo estas transkonstruita en ĉi tiu loko. Komence la domo estis konstruita en la elememta lernejo Mooka. La domon Kubo donacis, tial ĝi estas nomata "Kubo-aŭditorio". Kaj kiam la domon oni konstruis, Kubo faris la konkurson pri artoj de gelernantoj, kaj dum kvin jaroj tio okazis sep fojojn de 1938 ĝis 1942. Apud la domo, mi sentis lian varman koron por gelernantoj pro tio.

#### Urbeto Maŝiko

Kaj refoje, la familio veturigis nin per la aŭtoj al la urbeto Maŝiko, kiu situas oriente de la urbo. La urbeto estas fame konata kiel ceramika urbeto. De antaŭ ĉirkaŭ 160 jaroj, la urbeto produktadis multajn ceramikaĵojn por la vivado de multaj homoj. S-ro Gemrich ankaŭ ĉi tie faras ceramikaĵojn kiel artisto de ceramiko. Ni vizitis la ekspoziciejon de la ceramikaĵoj. Tie de la ekspozicieja estro mi aŭdis, ke la urbeto Maŝiko estas tenera por eksteruloj.

Poste ni libere promenis en la urbeto. Kaj vespere ni revenis al Jokohamo.



Kubo-aŭditorio


## Kun filipina junulo

Sibayama Zyun'iti

La 15an de junio, ni geedzoj gvidis filipinan junulon Albert Garrido, tra Kamakura kaj Jokohamo turisme. Li estis invitita de la du lokaj kongresoj, en Tokio (la 11an, 12an de junio) kaj en Osako (la 18an, 19an de junio), kaj intertempe li vizitis ĉirkaŭajn lokojn, unu el kiuj estis ĉe ni. Li estas studento kaj la plej granda motoro de la nuntempa Esperanto-movado en Manilo, la ĉefurbo de Filipinoj.

En tiu tago, ni "trovis" lin en la kajo de Stacio Jokohamo, en vagono veninta de Haĉiooĵi. Ni unue vizitis distrikton Hase en Kamakura, kaj intencis tagmanĝi. Sed ĉirkaŭaj restoracioj estis jam plenaj, aŭ fermitaj (pro merkredo), kaj pene trovis manĝejon. Li ne kutimis manĝi krudan ovon, kaj ŝatis sukcon de mango. Ni vizitis la Grandan Budhon kaj la Templon Hase. Poste, ĉar trajno direkte al Jokohamo plenas de homoj, ni iris tra Zuŝi al Stacio Jokohamo. De

proksime de tie ni prenis boaton ĝis la Havena Parko, supreniris la Turon Maran (Marine Tower), kune manĝis *okonomijaki* ĉe Sakuragiĉoo, kaj sendis lin al Haĉiooĵi, kie li restis tiamajn tagojn.



fotita de Sibayama Noriko

## TIEL OKAZIS

### La 102a Legokunsido

jun. 4; pri tio, legu apartan artikolon! (p.1)

### Hama-Ronda Vespero en junio

jun. 18, 17h00-19h00, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa

Estis 2 temoj, kun entute 12 partoprenantoj.

(1) **Prelego de Aihara Misako, "La germana kongreso, skeĉo kun sufloro kaj aliaj"**. S-ino Aihara prezentis ĉi-jaran germanan kongreson, kaj aldonis unikan metodon praktiki Esperantan konversacion.

(2) **Festado de la eldono de "La Orpantalono"**. La libro estis 2-lingva, nome en Esperanto kaj en la japana laŭ la traduko de s-ino Ohguro Yukiko. Ŝi parolis pri tiu traduko, kaj s-ino Doi Ĉieko parolis pri la eldonado de tiu ĉi libro.

### Vizito de Yamasita Tosihiko el Kagoshima

Jun. 25, 15h00-17h00, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa

S-ro Yamasita, la ĉefo de la Rondo de Kagoshima, vizitis nian rondon, spektis la lernadon, kaj poste 7 el niaj membroj havis babiladon.

## NIAJ PLANOJ

### Foto-ekspozicio pri internacia kunfluo

+ lernolibroj de la mondo

aŭg. 22 ĝis 24, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa  
Ni ekspozicios pri Esperanto kaj fotoj de niaj Esperantaj agadoj. Ĉi-jare ni krome ekspozicios nacilingvajn lernolibrojn por unuagradanoj, kolektitaj el la mondo per la reto de Esperanto.

### Parolo pri "miaj someraj spertoj"

sept. 3, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa  
Niaj rondanoj parolos Esperante pri siaj spertoj (ne nepre Esperanto-rilataj).

## Niaj Klasoj kaj Kursoj

Okazas jenaj klasoj (ĝenerale en Kanagawa-Kenmin Sentaa)

\*Regulaj Klasoj en sabato:

(1) Klaso Esenco por legi "Esenco kaj Estonteco de la ideo de Lingvo Internacia"/(2) Jokohama Salono. 2 fojojn oni legas el libro: "Vizaĝoj" / (3) Daŭriga kurso 2, lernado per "Hanako"/ (4) Daŭriga kurso 1, tagoj nefiksitaj, lernado per "Hanako"

\*Regulaj Klasoj en merkredo:

(1) Oni legas "La Zamenhof-Strato" de Roman Dobrzyński / (2) Daŭriga kurso: legata libro estas "Barbro kaj Eriko".